# Marko malsanas.

Tasko : Aldonu la ĝustan posedan pronomon!

Situacio :
Marko havas edzinon Ŝila kaj najbaron Franko, kiu havas edzinon Groŝa.

1. Ŝila iros al la marbordo kaj resaniĝos.

   *Marko sendis ……………. edzinon al la marbordo por …………. resaniĝo*.

2. Ŝila iros al la marbordo, por ke Marko resaniĝu hejme en paco.

   *Marko sendis ……………. edzinon al la marbordo por …………. resaniĝo.*

3. Franko iros al la marbordo kaj resaniĝos.

   *Marko sendis ……………. najbaron al la marbordo por ………... resaniĝo.*

4. Franko iros al la marbordo, por ke li ne plu ĝenu Markon, kiu estas malsana.

   *Marko sendis ……………. najbaron al la marbordo por ………… resaniĝo*

5. Groŝa iros al la marbordo, por ke Franko resaniĝu hejme.

   *Marko sendis …………… edzinon al la marbordo por …………. resaniĝo.*

6. Ŝila, Franko kaj Groŝa iros al la marbordo, por ke Marko resaniĝu hejme en kompleta trankvilo.

   *Marko sendis ……………. edzinon, ……………… najbarinon kaj ……………..*

   *edzon al la marbordo por …………. resaniĝo*

7. *Marko kaj ……… najbarino iros al la marbordo, sed temas ne pri resaniĝo.* ☺

Solvo por la ekzerco *Marko sendis….*

1. Ŝila iros al la marbordo kaj resaniĝos.

   *Marko sendis **sian** edzinon al la marbordo por **ŝia** resaniĝo*.

2. Ŝila iros al la marbordo, por ke Marko resaniĝu hejme en paco.

   *Marko sendis **sian** edzinon al la marbordo por **sia** resaniĝo.*

3. Franko iros al la marbordo kaj resaniĝos.

   *Marko sendis **sian** najbaron al la marbordo por **lia** resaniĝo.*

4. Franko iros al la marbordo, por ke li ne plu ĝenu Markon, kiu estas malsana.

   *Marko sendis **sian** najbaron al la marbordo por **sia** resaniĝo*

5. Groŝa iros al la marbordo, por ke Franko resaniĝu hejme.

   *Marko sendis **lian** edzinon al la marbordo por **lia** resaniĝo.*

6. Ŝila, Franko kaj Groŝa iros al la marbordo, por ke Marko resaniĝu hejme en kompleta trankvilo.

   *Marko sendis **sian** edzinon, **sian** najbarinon kaj **ŝian** edzon al la marbordo por **sia** resaniĝo*

7. *Marko kaj **lia** najbarino iros al la marbordo, sed temas ne pri resaniĝo.* ☺